




Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k92.html>

Ĉu novaj politikistoj faros novan politikon en Hispanio?

Humursenco neniam kaŝu amosencon

Aldonu merizojnal pavo



Paŭlo Iglesias puŝas ŝanĝon en hispanan politikon

Redaktore

Jam la jaro finiĝas, kaj ni ne venis antaŭ vin, leganto, de la pasinta monato de februaro. Ne, ĉi tiun jaron ni ne venis antaŭ vin per nia magazino, kiel mi intencis.

Du jarojn antaŭe mi preskaŭ promesis, ke **Kajeroj el la Sudo** aperos po monatotrio, se ne monatoduo. Bedaŭrinde, mi okupiĝis per aliaj aferoj, kaj mi ne akurate povis redakti la magazinon. Mi esperas, ke dum la venonta jaro, 2016-a, tio ne okazos, kaj niaj legantoj povos denove legi kaj reagi al la artikoloj kaj novaĵoj, kiujn ni metos antaŭ li aŭ ŝi, tiel ke nia magazino ne estos afero de pasinto.

Dum ĉi tiu jaro multe da aferoj priokupis nin, ne estante la plej neglektebla tiu pri balotoj por povo en Hispanio, kies rezulto ŝajnigas aperigi novan manieron politikumi ĉe ni. Tamen paroli pri leĝfarantoj kaj registaro estas neglektebla en Hispanio, ĉar laŭ artikolo 99^a de la Hispana Konstitucio, la Reĝo nomumos la plej voĉdonitan deputiton Prezidento de l' Registaro, kies ministrojn li mem nomumos. Tio signifas, ke en Hispanio ne ekzistas demokratio, ĉar Parlamento ne povas, denaske, kontroli la registaron, la registaron ne kontrolas la Parlamenton, kaj de la registaro de PSOE gvidate de Felipe González, ankaŭ la juĝistoj estas kontrolataj de juĝarta korpo, Alta Konsilaro de Povo Juĝa, kies anojn la diversaj partioj politikaj nomumas, laŭ sia procentaĵo en Parlamento. Honto, ne demokratio.

Sed oni ne plendu, se oni voĉdonis en balotado. Neniu mensogis pri tio:

partioj politikaj, ne civitanoj decidas en Hispanio. Ni ne povas decidi pri tio, kiu estos en listo de partio. Se oni ne estas en listo prezentata de politika partio, oni ne povas esti voĉdonata en baloto, eĉ se kaj la balotanto kaj balototo volas. Sekve, deputitoj ne estas lojalaj al popolo, sed al siaj partioj politikaj. Sekve, se deputito ne servos al mi, mi ne voĉdonas al li aŭ ŝi. Tio ankaŭ okazis dum la Diktaturo de Fransisko Franko: tiaj deputitoj servis al la Diktatoro, ne al popolo, eĉ se popolo voĉdonis por la Trio Familia, sed la povon havis unu partio, tiu de la registaro. Nun estas kvar partioj, kiuj havas la povon en Hispanio. Sed civitanaro tute fremdas al povo kaj tiam kaj nun. Sekve, mi lasas partianojn, ke ili voĉdonu ilin mem, ĉar mi konscias, ke kiu ajn venkos, faros same: ili servos sian partion, ne la civitanaron. Do fi al ili ĉiuj, almenaŭ ĝis ili ŝanĝos la konstitucion tiel ke ni, la popolo, suverenos.

Ni legos en tiu ĉi 92^a numero de nia magazino ankaŭ pri tiu revo de multaj el ni, La Tria Respubliko, pere de la sepa ĉapitro, *Aldonu merizojn al pavo, de mia novelo **Vivu la Respubliko!***, kiu tiom da timo vekis en kelkaj homoj. Tio estas novelo, revo, sopiro, sed fakte ne estas manlibro. Ankaŭ vi legos pecon de la verko de Prus' **La Faraono**, kaj ankaŭ diversajn artikolojn socialajn, kaj politikajn.

Mi esperas, ke vi ĝuos la magazinon sufiĉe, por ke vi emos legi la sekvontan numeron, espereble en februaro.

Dume, elkore mi salutas vin kaj deziras al vi fruktodonan novjaron,

Jesuo.

Ĉu novaj politikistoj faros novan politikon en Hispanio?



Paŭlo Iglesias Turrión (ne konfuzu kun Paŭlo Iglesias Posse, fondinto de partio politika PSOE) estas plej ŝokanta ekzemplo pri nova politikisto hispana.

Li komencis famiĝi kiam li estis profesoro en Universitato Komplutense de Madrido pro liaj intervenoj en debatoj televidaj pri politiko kaj ĝeneralaj aferoj en Hispanio. Li mem kunkreis televidkompanion, kie li gvidas programojn *La tuerca* (*La ŝraŭbingo*, hispane), kaj *Fort Apache*, du programoj pri politika debato.

De la komenco de sia publika vivo, li rivelis ŝokajn vidpunktojn: oni ne pagu la nacian ŝuldon al Eŭropo; oni eliru NATOn; oni plialtigu la impoŝtojn por disdoni pli justajn salajrojn al ĉiu hispano, eĉ al tiuj, kiuj neniam laboris, kiuj rajtas, laŭ li, preni €400 nur pro tio, ke li aŭ ŝi naskiĝis... Ankaŭ liaj opinioj estas

tre malkutimaj: *Gilotino estas fundamenta ero de demokratio; viaj maldekstremecon oni mezuras per via distanco al polico; aŭ La krizo finos kiam timo ŝanĝos sian flankon.* Paŭlo Iglesias difinas sin kiel maldekstra, eĉ komunisma, sed li diras, ke *bona komunisto estas tiu, kiu venkas en politiko, kaj tiu komunisto, kiu ne venkas, estas malbona komunisto.*

Eĉ se li klarigis sian logikan penson, tiuj ideoj vekis multe da timo en nuna Hispanio, post kiam li fondis la civitanan movadon PODEMOS (ni povas), kiu poste iĝis politika partio kaj konkurencis al Eŭropa Parlamento kaj gajnis kvin deputitojn je 2014, nur unu jaron post sia stariĝo kiel politika partio. Ne malbone, ĉu ne, se oni konsideras, ke Izquierda Unida (unuiĝinta maldekstro) estas la plej simila partio al PODEMOS, kaj ĝi stagnis dum jardekoj kaj gajnis nur kelkaj deputitoj en la hispana parlamento. Vidante, ke la nova partio havas multe da altiro inter

junuloj kaj ne tiom junaj homoj en Hispanio, multaj aliaj homoj sentis sin devigataj voĉdoni denove favore al partio kun plej granda kvanto da koruptaj politikistoj, Popola Partio.

Tamen, li sukcesis ŝajnigi, ke la dupartia sistemo jam mortis en Hispanio. El lasta balotado venis, ke anstataŭ du grandaj partioj, nun estas kvar: Popola Partio (124 deputitoj), PSOE (90), PODEMOS (ni povas, 69 deputitoj) kaj Ciudadanos (civitanoj, 40 deputitoj). Laŭ mi tio estas nur ŝajna morto de dupartia politiko, ĉar PP kaj Civitanoj estas sufiĉe proksimaj, kaj PSOE kaj PODEMOS ankaŭ, pro tio, ke ili du estas maldekstraj partioj, kaj se ili alianciĝas, oni denove havos dupartian politikon en Hispanio, eĉ se kun nuancoj, kiuj ne ekzistis antaŭe.

Mi aŭdis liajn prelegojn en televido, kaj mi ne povis ne pensi pri tiu rolulo (en la novela trilogio de Izaak' Asimov' **La fondaĵo**), *La mulo*, kiu altiris onian lojalecon al li senrigarde al tio, kion li diris. Fakte liaj ideoj konvinkas mi mem multe, ĉar li prave signalas la difektojn de nia politika sistemo, kaj denoncas politikistojn koruptajn kaj promesas, le kiam li regos kiel prezidanto, tio ne estos ebla. Tamen la simpatio de PODEMOS kaj ties gvidanto al registaro de Venezuelo de Hugo Chavez kaj Nikolao Maduro pensigas nin en Hispanio, ke ne ĉio, kion li promesas, estas tiom dezirebla. Venezuelo estas riĉa lando, sed tamen venezuelanoj malsatas kaj ne povas trovi tion, kion

ili bezonas en vendejojn. Ni komencis pensi pri tio, kio okazos en Hispanio, se nova registaro faros same ĉi tie, ĉar ni ne estas riĉa lando. Sed PODEMOS kaj Paŭlo Iglesias ne kritikis eĉ unu fojon al reĝimo, kiu regas la fratan landon, Venezue-lon. Parolante pri Hugo Ĉaves, li havis nur vortojn de miro kaj respekto. Kaj tio timigas homojn en Hispanio antaŭ la ebleco, ke li ja iĝos Prezidento. Mi opinias, tamen, ke pro tio, ke li konkurencis per la aktuala maljusta sistemo, li faros ne tre diverse al tio, kio la PPanoj aŭ PSOEanoj faris. Fakte, nenio utila aŭ bona por la lando, sed tio, verŝajne, ne venezueligos Hispanion. Espereble. Sed multe da homoj jam ekmoviĝis por malebligiton.

Sed mi ne neos la brilan atingon de tiu ĉi politikisto: li kreis novan manieron politikumi en Hispanio, kaj eble pro lia farado ni baldaŭ ĝuos novan konstitucion, eble unu, kiu estos demokratia, aŭ almenaŭ pli demokratia ol tiu ĉi, kiun ni suferas nun.

Nun partioj politikaj hispanaj diskutas pri la konveno pakti por starigi registaron, aŭ ripeti la balotadon post tri monatoj, kaj mi ne scias, kio estos pli bone. Sed tio neniam antaŭe okazis en Hispanio. Tio estas danke al Paŭlo Iglesias kaj ties agado. Pro tio mi diras, Dankon, Paŭlo!



Vivu la respubliko!

Aldonu merizojn al la pavo

Tial de nove venis balotado. Deputitoj, kiuj faris kaj aprobis la Konstitucion, ne plu povis fari leĝojn, tial, ke ili mam plenumis la demoarŝon, kiun popolo petis de ili. Pro tio nova balotado estis necesa.

Siaj amikoj ĉifoje konvinkis la Soldaton, ke li devas postuli sin al nova elekto per malferma listo. Li sciis, ke neniu konas lin, do li diris, ke bonorde, konsentite, li provos.

Kaj en televido oni demandis al li pri aborto. Kaj li diris, ke tio estas barbareco. Oni diris al li, ĉu virinoj ne povas disponi libere pri sia korpo. Kaj li diris, ke jes. Sed la infano ankaŭ. Tion ne ŝatis feministoj, sed ili estis nur kvar. Oni ankaŭ demandis al li pri tio, kion li opinias pri samseksemuloj. Kaj li diris, ke li lasas ilin en paco, kondiĉe, ke ili lasu lin en paco, ankaŭ. Kaj tiam oni demandis al li, ĉu li estas sodomifobia. Kaj li demandis, kio diable tio estas. Kaj oni diris, ke li estas masklista. Kaj li diris, ke eble. Sed ke tiuj sodomifobuloj, kiujn ili prirakontas, kvankam li ne konas ilin, devus havi en respubliko ankaŭ la rajton diri tion, kion ili pensas. Kaj ke aliuloj ne rajtos silentigi ilin, ĉar tio devos esti kontraŭleĝe, same kiel se ili dirus male. Kaj poste oni demandis, kion li opinias pri NATO. Kaj li diris, ke se tio eblus, ili devus foriri el ĝi, sed se tio ne

eblas, lando ankaŭ devas honorigi sian kompromiton. Sed li aldonis, ke li ŝatis la sovetulojn hieriaŭajn, kiuj kulpas pro tio, ke oni faris NATO, kaj ankaŭ li ne ŝatis maŭrojn hodiaŭajn, kiuj faligis la Ĝemelajn Turojn, kiuj estis farintaj nenion kontraŭ ili. Oni demandis al li ankaŭ pri tio, kion li opiniis pri tio, ke homoj havus pistolon, kaj li diris, ke estas pli bone, ke honestaj homoj havas pistolon, ol tio, ke nur krimuloj havas ĝin.

Kaj li diris multajn sensencaĵojn pli, kaj ankaŭ aliajn aferojn politike tre malkorektajn. Sed amasmediuloj hieraŭaj eraris pri tio, ke pli ol tion, kion li diris, homoj ŝatis kiel lidiris ĝin, kaj ĉefe kiel li diris ĝin. Kaj laŭ la tuta intervjuo eivdentiĝis, ke La Soldato zorgis multe pri la popolo, kaj kiel li klarigis, la popolo estas ĉiu el tiuj, kiuj aŭskultas lin. Ke li fekas sur grandajn kompaniojn kaj arojn da funkciuloj kaj sur tiujn, kiuj agis kvazaŭ ili estas funkciuloj, ĉar tio, kio gravas, estas la individuo, la persono, kiu suferas, kiu pensas, kiu okazigas societon kaj ŝtaton, kaj nek la unua nek la alia povas malamikiĝi al individuo, ĉar li aŭ ŝi havas la sanktan devon finiĝi la alian kaj la unuan se ili ambaŭ ne servas al ĝi, sed volas, ke ĝi servu al ili.

Tial La Solado ricevis pli da voĉoj ol aliu ajn en la tuta lando. Ĉar li estis tia, kia li estas, kaj li ne volis ŝajnigi cele al gajni povon per kiu

li faru ion, kion li ne volas fari. Pro tio li preferus, ke oni ĵetu lin anstataŭ voĉdoni por li. Sed tial, ke societo estas arigita de individuoj same kiel li, kiuj zorgas pri la estonto de siaj geinfanoj kaj volis pliboniĝi kiel personoj kaj civitanoj, aperis parlamento da deputitoj pli kohera ol oni antaŭvidis.

La politikaj partioj estis reprezentataj, sed sendependuloj estis multaj pli. tial la unua proponoj, kiun ili privoĉdonis estis tiu, ke partia disciplino estas malpermesita. Ĉiu deputito havis la egan respondecon voĉdoni nur laŭ sia konscienco, kaj favori la komunan bonon de la civitanaro, tiel ke estus perfido kaj krimo persekutota ĵure, fari tion alimaniere, ĉefe se tio estas por favori partion aŭ personon kies intereso kolizias kun tiu de la popolo.

Kaj La Soldato parolis tre bele en ĉiu debato.

Dek tagojn post la balotado, oni proponis elekti Prezidanton de la Registaro. Sed La Soldato diris, ke tio ne estas demokratia. Ke la registaro devas esti balotita de la popola, ne de ili, la Parlamento. Oni diris al li, ke ne, ke tiel diras la konstitucio.

«Do oni devas ŝanĝi la konstitucion», La Soldato diris. «Se ĝi naskiĝis kun defekto en la koro, oni devas operaciumi ĝin, tiel ke ĝi ne mortos». Kaj li proponis, ke oni voĉdonu pri tio,

ke la Prezidanton de l' Registaro elektu la popolo, same kiel la popolo elektis ilin, parlamentanojn. Kaj ke tia prezidanto ne povos esti, samtempe, deputito en Parlamento. Kaj ke la Prezidanto povos elekti iun ajn kiel ministron, kondiĉe ke la ministro elektita ankaŭ ne estas deputito, kvankam eksdeputito ja povas esti ministro.

Kelkaj deputitoj ne komprenis tion. «Ĉu vi volas esti pli lerta ol tiuj, kiuj estis ĉi tie antaŭ ni?»

Sed li diris al ili, ke tio ne estus tre malfacila. Ne pro tio, ke li estas pli lerta, sed ke la gvidantoj de la aliaj respublikoj, kiuj estis antaŭ ĉi tia, estis tre mallertaj.

Kaj li diris pli da aferoj. Li diris, ke Parlamento devas kontroli la Registaron tiel, ke ĝi ne agu kontraŭleĝe kaj tiel, ke ĝi ĉiam laboros por la bono de la popolo. Kaj li proponis, ke juĝistoj tute ne rilatos al Registaro aŭ al Parlamento. Ke la popolo mem elektu la juĝistojn. Ke tiuj juĝistoj elektu siajn reprezentantojn en la Alta Povo Juĝa, organo kiu devas certigi, ke juĝistoj estas justaj kaj forpuŝi tiujn, kiuj ne estas justaj. Kaj ke neniu partio politika aŭ politikisto povos influi en decidoj de juĝistoj, ĉar tio estos ĵure punata.

Tiu estis la dua ŝanĝo, kiun proponis La Soldato al la Konstitucio de Respubliko.

Kaj la deputitoj nun aŭskultis lin

anstataŭ ridaĉi pri li kaj insulti lin, kaj sekve ili aprobis la du ŝanĝojn de li proponitaj, pere de unuanimeco.

«Sed tio ne sufiĉas», diris La Soldato. «Nun ni devas demandi la popolon».

Sed tio estas same kiel demandi al infano ĉu li deziras panon kun ĉokolado por manĝi. La popolo jesis, centprocente.

La Soldato konis la popolon. «Mi estas popolo», li diris en radiointervjuo. Nun la ĵurnalisto ne plu demandaĉis tiajn strangaĵojn. Nun li demandis pri tio, kio estas la plej bona de l' popolo. Kaj li diris, ke virinoj. Ĉefe du, kiujn li konis. Unu, kiu jam mortis, kaj alia, kiu atendas lin en sia vilaĝo.

Unu semajnon poste li edziĝis al ŝi. Ili ne multe kredis pri Dio, sed la religia ceremonio donis iom pli da respektado. Ankaŭ, vilaĝa estas unu el la personoj, kiuj plej amas La

Soldaton. Ĉar li defendis en Parlamento, ke la Konkordato estas donita vorto, kaj homo, kaj ankaŭ popolo, devas honori tion, kion ili promesas.



Miguel Liger kaj Imperio Argentina kantis *Échale guindas al pavo* je 1936, faman kanton, en tiu ĉi filmo, **Brunulino Klara** (kiu titoliĝas ĉi tiun ĉapitron),

Humursenco neniam kaŝu amosencon

Hodiaŭ oni celebras La Tagon de Senkulpuloj. Mi opinias, ke estas vera honto, ke amasmurdado de senkulpaj geinfanoj ĝis dujaraĝaj plenumita en antikva aĝo de reĝo senskrupula kaj ties fiuloj okazigis tion, ke hodiaŭ, decembron la 28an, oni primoku nin per la maniero plej sendiskriminacia, sutila aŭ mal-sutila, kaj eĉ tion, ke oni ne pagu ŝuldojn, kiujn oni pruntos hodiaŭ. Ne akcepti tion, oni diras, estas manko da humursenco. Sed tiu humursenco estas fia kaj sensenca, kaj ni plej bone ni ignoru ĝin. Ni havu pli da amosenco ol humursenco, tiu afero pri kiu oni scias nenion, ĉar ni ĉiuj havas ideon pri tio, kio amo estas, eĉ se oni pro

tio, ke oni rakontis al ni. Kaj ne estas pli granda amo ol tiu, kiu oni povas senti pri infano, aŭ pri infaneco ĝenerale, ĉar ni ĉiuj estis infanoj, kvankam kelkaj ŝajnas, ke ili jam forgesis pri tio.

Mi proponas pasigi la tagon de ŝerco, se oni vere emas ŝerci, al la 1^a de aprilo, kiam oni datrevenas la turpecon de kolonistoj francaj en Ameriko, kiuj daŭre celebris la komencon de la jaro multe post kiam la reĝo de Francio deklaris, ke la komenco de la jaro ne plu estis la 1^a de aprilo, sed la 1^a de januaro, je 1564. Sed mi trovas malfacile defendebla rilatigi agon fian, amasmurdadon de geinfanoj, al senlima ŝercado multekolora.



Ĉi tiun tagon, decembron la 28an, devus esti LA TAGO DE LA MISTRAKTITA INFANO. Mistraktita de ĉiu vidpunto: fizika, psikologia, kultura... Jes, ĉar kelkaj kulturoj mistraktas infanojn. Kiam mi vizitis Egipton, surprizis kaj kolerigis min tio, ke mi ekscii, ke tie ne ekzistas deviga instruado, kaj sekve infanoj edukiĝas surstrate, aŭ hejme, aŭ tiel, kiel ili povas. Ne ĉiuj havas riĉajn gepatrojn, kiuj povas pagi privatajn lernejojn, kiuj estas la solaj, kiuj ekzistas tie. Poste mi enketis pri kiel deviga instruado fartas en la cetera mondo, kaj mi konstatis, ke tio ne estas universala, malgraŭ la plendoj de Jan Komeniuŝ, kiu je jarcento 16^a jam diris, ke edukado devas esti komuna al ĉiuj geinfanoj el la mondo, kun la samaj programoj kaj enhavoj, kaj la sama horaro. Ni ne multe progresis de tiam. Hodiaŭ ni havas devigan instruadon en Eŭropo kaj parto de Ameriko, kaj en malmulte da landoj en la cetera parto de la mondo. Tio ĉi estas eraro, ĉar en geinfanoj kuŝas la estonto de homaro, kaj se la plej parto de la homaro estas misedukita, oni ne marŝas bone. En la cetero de la mondo nur la infanoj de inteligentaj riĉuloj eniras pli bonan mondon, tiun de edukado.

Infanojn oni devas ne nur eduki: oni devas ami ilin ankaŭ. Tial mi proponas, ke ĉi tiun tagon, **la 28-an de decembro**, ĉesu esti la fia

Tago de Ŝerco por iĝi **La Tago de la Infanaĝo**, same kiel tago de virino laborista estas tiu, kiam oni amasmurdis laborostinojn en faktorio de Usono. Jes, mi scias, ke aŭtoritatoj ignoros mian plendon, sed tiu mia ne estas peto al aŭtoritato pli-malpli kompetenta, sed al civila societo, tiel ke oni ĉesu fari tiun stultaĵon kaj ni ĉiuj pensu aferojn antaŭ fari ilin. Tio estus bona Kristnaska Donaco por ĉiuj infanoj niaj. Ĝi ĝenus nur senbridulojn, sed tiuj, eĉ se multaj, ne estas rimarkindaj. Se ni nur riproĉas hodiaŭajn ŝercojn, tio ja sufiĉus.



Alia mondo eblas

Jen la temo de mia libro **Oficiro kaj dancistino**, kiun ni antaŭ nelonge publikigis en la hispana. Per tiu libro mi kontraŭstaras la vivon de tantra dancistino de antaŭ mil jaroj kaj tiun de leŭtenanto de SS germanaj dum la Dua Mondmilito. La unua, Ŝajla, havas metion, kiu odiaŭ estus akre kritikata de societo puritanisma kaj mallarĝomensa hodiaŭa, ĉar ŝi ĉirkaŭas la limojn de reganta moralo, kvankam en tiu preskaŭ sanskrita societo tio etis tre kutima: tio estas kion ŝi konas kaj kion ŝi vivis dum la ok dek jaroj de sia vivo. Male, leŭtenanto Peller estis ĉio, kion bona naci-socialisto devis esti en la tridekaj jaroj de la jarcento 20^a. Tiom bona, ke li sukcesis ekdirekti ekstermejon kiam li jaraĝis nur 22.

Tamen, Peller estos persekutata dum sia tuta vivo de plej nigraj momentoj de sia vivo, kiam lia diabla animo sufokis ĉion bonan, kio estis ĉe li, kaj tio provis eliri el sia koro ĝis la akurata momento de sia morto. Male al Ŝajla, Hans kaŝiĝas en la pejzaĝon, ĉiaman ŝanĝante, interpretante la ŝanĝantajn dogmojn de sia vivo laŭ sia cirkomstancaro, kaj elstarante per la maniero, per kiu li povas, el la puto de putro en kiun sia ideologio ĵetis lin.

Simile ni povus paroli tiel pri la nuna hispana societo, ĉar de ĉi tiu puto de putro en kiu ni estas submetitaj oni ja povas eliri. Mi

memoras kiam la Puĉo de Tejero, je 1981, malmultaj civitanoj eliris



surstrate alfronti la tankojn de Milans del Bosch. Fakte neniu, kaj fakte tiuj malmultaj, kiuj elhejneiris nur deziris «rigardi», dum tiuj, kiuj nun fanfaronas, ke ili venigis demokration ĉi tie tiam estis tro okupataj vicante ĉe la landlimo de Francio *okaze*, ke la puĉo sukcesos... Sed tiu malkuraĝo, kiun ni ankoraŭ pagas ne estas tiu de 1981, sed tiu de 1978, la jaron, kiam ni devintus diri NE. Ni povintus fari tion, sed sufiĉis, ke Prezidento Sũares kaj

kunantoj referencis al tio, ke se ni ne volas tiun konstitucion, militistoj denoven venos kaj starigos registaron diktatorecon por tio, ke ni ĉiuj ŝafe voĉdonis, malkuraĝaj kiel musoj, preskaŭ unuanimecan jeson. Mankis al ni kuraĝo, orgojlo, sentimo unuafoje dum nia historio por diri **Ne, dankon** kaj sciigi al Manŭel' Fraga kaj aliaj *Patroj de Konstitucio*, ke ne ni toleras konstitucion mendita de parlamento frankisma, sed, ke ni volas baloti Konstituciigantan Parlamenton, tiel ke ĝi kreos vere Demokratian Konstitucion, kaj anstataŭ ĉi tiun diktatoreco de partioj, kiujn oni enmetis ŝajnigante neekzistantan demokration, ni preferas tiun, kiuj militistoj kreos, ĉar ĝi estos multe malplikosta, kiel fakte okazis dum la pasintaj kvardek jaroj. Dum ĝi oni ne devis donacian heredaĵon al Mursja Komunumo, ekzemple, ĉar oni ne povas pagi la impoŝton (35% de la valuto de la heredaĵo), al kiu oni devas aldoni 21% pro IAV (Impoŝto sur Aldonita Valuto) se oni vendas la proprajn por povi pagi al mursja komunumo, kaj tiel oni ricevas nur 49% de la valuto de la hejmo, kie oni eble pasigis la tuton de sia vivo, kaj se oni povas pagi la impoŝtojn, oni devas pagi plurfoje tion, kion gepatroj pagis siatempe, nur por povi daŭrigi sian vivon tie. Kaj tio estas nur ekzemplo pri trouzo da povo, kiun ni suferas en ĉi tiu mona diktatoreco.

Tio estas rekta sekvo de tio, ke oni ne kuraĝis defii la situacion tiam. Same kiel mi diras per mia libro kopmarante tiujn du vivojn, kiuj ŝajne ne rilatas unu la alian, ĉi

tie oni povintus fari aliel. Se ni havus veran demokration, ĉi tio estus respubliko, kaj ne estus bofratoj aŭ bofiloj de ties prezidento, kiuj enriĉiĝus, ĉar nek unu nek la aliaj estus nerespondecaj antaŭ komuna juĝejo, krom por liberesprimi siajn politikajn opiniojn; kaj ankaŭ pro tio, ke ĉiuj politikistoj estus, same kiel en ĉiu ajn vera demokratio oni devas fari, respondecaj pri siaj agoj kaj decidoj, kaj estus tute eble enkarcerigi ilin pro perfido al nacio kiam ili faros decidon kontraŭ la intereso nacia, kio estas tute nekonnata en ĉi tiu demokratio, kie oni vidas, ke estas enriĉiĝo de entreprenoj kiel Iberdrola aŭ Endesa danke al politikoj de registaroj, kies anoj poste eniras la administrokordon de tiuj entreprenoj kun milionaj salajroj. Tio en vera demokratia lando supozus karceron kaj nuligon de tiuj leĝoj, sed en ĉi tiu lando nenio okazas, ĉar Hispanio englutis ĉion. Eble tion celis diri Prezidento Aznar', kiam li diis, ke *Hispanio iras bone*. Li nur forgesis aldoni por kiu iris bone ĝi. Por ili, la politika klaso, evidente jes. Por ni, la popolo, ĉio iras tiom malbone, kiom bone iras por ili, ĉar por ke kelkaj gajnu, aliaj devas perdi. Ĉu ekzistas en Hispanio politikistoj, kiuj zorgis pri la bonesto de hispanoj? Mi dubas. De Virjato ĝis ni mi scias pri nenio, kion oni faris favore al popolo en ĉi tiu lando, kun la escepto de la Nacia Hidrologia Plano, kiun oni elpensis dum la Dua Respubliko, defendis ĝisoste socialisto Indalecio Prieto (*esti kontraŭ la NHP estas ne nur malhispane, sed ankaŭ malsocialisma*, li diris), kaj

Generalo Franko efektiviĝis en ĝia unua parto, kiu plibonigis la situacion en Mursja, Alikanto kaj Almerio ĝis kiam kastilianoj de Toledo marteladis pri tio, ke estas pli bone lasi la akvon perdiĝi en Golfeto de Setubal, Portugalio, ol savi la terkulturejojn de Alikanto, Mursja kaj Almerio, ĉar akvo kaj tero ne komprenas pri aŭtonomioj kaj antonoliaj, kio estas tio, kio tiuj tajforegnoj ŝajnas: io, kio ne apartenas al civitanoj, krom la momento pagi.

Sed alia vojo estas ebla. Alia vivo eblas. Same kiel la vivo de Ŝajla ne rilatas al tiu de Hans, same kiel tio, kio estas nigra en la vivo de li, estas pasiruĝa en tiu de ŝi, ni, hispanoj povas havi alian landon, se ni vere volas, ni povas havi alian landon. Cele al tio, ni devas forpuŝi el siaj sidlokoj tiujn politikistojn, kiuj jam forrabis nian suverenecon kaj daŭre ĝin uzurpas, ĉar suverena povo apartenas al popolo en vera demoratio, ne al politikaj partioj. Nun ŝajnas, ke ekzistas nova generacio de partioj, kiuj povus okazigi balotadon

por elekti Konstituciigantan Parlamenton kaj Referendumon por decidi kian landon ni volas kaj ĉu ni deziras Respublikon (senad-jektivan) aŭ Monarĥion vere demokratian, kaj ne tiun, kiun ni heredis de Frankismo. Ja sufiĉas elteni la ligojn de la Malnova Generalo.

Jam pasis 40 jarojn de lia morto, kaj ni ankoraŭ suferas tion, kion li lasis «ligita kaj bone ligita». Iam en Hispanio regis Falango, Opus Dei, kaj la Katolika Eklezio; nu estas vico por regi PP-o kaj PSOE-o, kaj eble CIUDADANOS (civitanoj) aŭ PODEROS (ni povas). Sed jam venas la horo, kiam la hispanoj regos pri tio, kion ni volas fari kun



nia lando. Jam venis la horo, kiam ni petos klarigojn al koruptuloj, sed ne nur al tiuj, kiuj rabis monon, sed ĉefe al tiuj, kiuj rabis nian suverenecon, ĉar ĝi jam elĉerpiĝis. pro tio ili devas redoni ĝin al ni. Kaj por tio estas necesa kondiĉo, ke Referendumo estos farita pri ĉu ni volas ĉi tiu Monarĥio heredita de diktatoro Fransisko Franko, ĉu Respubliko

en kiu ĉiuj hispanoj estos kunrespondecaj pri ĉio, kio okazos, ĉar ĉio okazos pro decido de deputitoj kaj registaro, kiuj neniel rilatos inter unu la alian, krom sia devo respondi pri siaj agoj antaŭ ĉiuj hispanoj, per siaj havaĵoj kaj eĉ sia libereco., se ili agas ne pro nia intereso. Kaj, aldone, alia postulebla kondiĉo ne negocebbla estas realigado de nova konstitucio, ĉi-foje demokratia vere, kiu garantios la bonfarton de hispanoj, ĉiuj hispanoj, kaj ne nur tiuj, kiuj plibonigis sian karieron pere de politika partio. Ĉar politiko devas esti servo, ne premio, devo, ne maniero enriĉigi sin. Se homo devas gajni sian vivon, li aŭ ŝi laboru, kaj je siaj libertempo, li aŭ ŝi povos labori cele al bonfarto de ĉiuj civitanoj el posteno de respondeco politika. Tial politikisto ne devas ricevi monon koste al ni, sed male, krei politikojn por ke ni ĉiuj havos sufiĉe da mono por vivi. Ne estas, ke ni enriĉigu, sed tio, ke ni povos manĝi ĉiun tagon, niaj geinfanoj havos aliron al kvalita edukado pagita de ĉiuj, kaj ke ĉiu ni ĝuos sanservon universalan, kaj ne nur ĝin ĝuos tiuj, kiuj pagas kotizon, ĉar tio igas ĝin la plej multekosta sankompanio en Hispanio, kiel montras la fakto, ke ili diras ke ne ekzistas kostotabulon pri sanservoj, sed poste ili postulas 332 eŭrojn por porti vin per ambulanco kelkajn centojn de metroj, aŭ mil eŭroj por nokto en hospitala emerĝencejo (UCI, hispane). En lando kies sanservo estas universale senpaga, neniu devos pagi eĉ unu eŭron pro tio, ĉar civitanoj, liberigitaj de salajroj milionaj por tiom da politikistoj, kiuj

neniel bonfatigas nin, havus sufiĉe da mono por pagi tiujn aferojn per impoŝtoj multe malpli pezaj ol tiuj, kiuj nun sufokigas nin.

Tio ĉi ne estas prelego por ke oni aĉetu mian libron, ĉar mi nur uzis ĝin kiel ekzemplon pri tio, ke aferojn oni povas fari laŭ alia maniero, pli ĝentila, eika kaj justa, kvankam dekomence ĝi ŝajnu male. Ĉi tie homoj skandaliĝas kaj ektimas kiam oni parolas al ili pri respubliko, sed en Portugalio, Francio, Italio, kaj Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko estas respubliko, kaj tie neniu mortigas unu la aliajn surstrate, ne pro politikaj kialoj, male al tio, kio okazis en tiu respubliko, kiu ekzistis ĉi tie je la lastaj jaroj 30-a, kiam aferoj ne bone venis ĉar ni ne laboris cele al tio. La Triano devas gajni per nia politika debato, nia bona agado, nia toleremo, nia solidareco kaj nia deziro fari aferojn bone. Ĉar ni ankaŭ ne kapablis konstrui monarĥion demokratian. Neniam ekzistis tio en Hispanio. La reĝo, de nememoreblaj tempoj estis la oleumita de Dio por regi nin, kaj tion ĉiuj devas akcepti, kaj dikredantoj kaj nedikredantoj, ĝis kiam Fransisko Franko venis, kaj post kvardek jaroj lasis lasis tiun ĉi monarĥion, en kiu la reĝo ne plu estas la Oleumita de la Plej Alto, sed nur proklamata de Parlamento..., parlamento devenanta el tiu frankisma.

Ni pensu pri tio ĉio, kaj ni akceptu, ke ni havas tion, kion ni meritas, ĝis kiam ni ŝanĝos ĝin. Kaj se ni sukcesas tion ŝanĝi, ni ankoraŭ meritos tion, kion ni havos post la ŝanĝon. Por bono aŭ malbono.

La faraono

Ĉapitro 41^a

La fenica pastrino ne multe da malpli plaĉi al Ramzes. feliĉo alportis al Ramzes. Kiam li venis unuafoje viziti ŝin en ŝian palaceton, kiun ĝis nun okupis Sara, li pensis, ke li estos akceptita kun admiro kaj dankemo. Sed Kama salutis lin preskaŭ kun kolero.

—Kio? —ekkriis ŝi —jam post duono da tago vi redonis vian favoron al la mizera hebreino..?

—Ĉu ŝi ne loĝas en ĉambro de l'servistoj? —respondis la princo.


—Sed mia intendanto diris al mi, ke ŝi ne lavos plu miajn piedojn...

La princo, aŭskultante tion, sentis tedon.

—Vi ne estas, mi vidas, kontenta —diris li.

—Kaj mi ne estos..! —ekplodis la fenicino —ĝis kiam mi ne humiliĝos ĉi tiun hebreinon... Ĝis kiam servante min kaj genuante ĉe miaj piedoj, ŝi ne forgesos, ke iam ŝi estis via unua virino kaj la sinjorino de tiu ĉi domo... Ĝis kiam miaj servistoj ne ĉesos rigardi min kun timo kaj malkonfido, kaj ŝin kun kompatato...

La fenicino komencis malpli kaj



—Kama —diris li —pesu bone, kion mi diros al vi. Se en mia domo servisto piedbatus hundinon, kiu nutras la idojn, mi forpelus lin... Vi piedbatis inter la okulojn virinon kaj patrinon... En Egiptio, Kama, pastrino estas granda vorto. Bona egipto tri aferojn plej multe respektas

sur la tero: la diojn, la faraonon kaj la patrinon...

—Ho ve al mi..! —kriis Kama, sin ĵetante sur la liton. —Jen mi havas rekompencan, mizera, ke mi forlasis mian diinon... Ankoraŭ antaŭ unu semajno oni metis florojn ĉe miaj piedoj kaj bruligis por mi incenson, kaj hodiaŭ...

La princo senbrue elglitis el la ĉambro kaj vizitis la fenicinon nur post kelke da tagoj.

Sed ree li trovis ŝin en malbona humoro.

—Mi petegas vin, sinjoro —ekkriis ŝi —zorgu iom pli multe pri mi..! La servistoj jam komencas malŝati min, la soldatoj rigardas min nekonfide kaj mi timas, ke iu ne

venenu miajn manĝaĵojn en la kuirejo...

—Mi estis okupita per la armeo —respondis la princo —mi ne povis viziti vin.

—Tio estas vera..! —respondis kolere Kama. —Vi estis hieraŭ sub mia balkono, kaj poste vi iris al la ĉambro de la servistoj, kie loĝas la hebreino... Vi volis montri al mi...

—Sufiĉe..! —interrompis la princo: —Mi estis nek sub la balkono, nek apud la ĉambro de l' servistoj. Se do ŝajnis al vi, ke vi vidis min, tio signifas, ke tiu malnobla greko ne nur ne forlasis Egiption, sed eĉ kuraĝas vagi en mia ĝardeno...

Kama aŭskultis terurita.

—Ho Astarte..! —ekkriis ŝi subite —savu min... Ho tero, kaŝu min..! Se la mizera Likon revenis, granda danĝero minacas min...

La princo ekridis, sed li ne havis plu paciencon aŭskulti la plendojn de la eks-pastrino.

—Restu trankvila —diris li elirante —kaj ne miru, se post kelke da tagoj mi alkondukos al vi vian Likonon, ligitan, kvazaŭ ŝakalon. Li jam elĉerpis mian paciencon.

Reveninte en ŝian domon, la princo tuj alvokis Hirammon kaj la poliestron de Pi-Bast. Li rakontis al ambaŭ, ke Likon, greko, kies trajtoj tre similis liajn, vagas apud la palacoj, kaj ordonis kapti lin.

Hiram ĵuris, ke kiam fenicoj kuniĝos kun la polico, la greko devos fali en iliajn manojn. Sed la poliestro komencis skui la kapon.

—Vi dubas? —demandis la princo.

—Jes, sinjoro. En Pi-Bast loĝas multaj piaj Azianoj, laŭ kies opinio pastrino, forlasinta la altaron, meritas la morton. Do se la greko ĵuris mortigi Kaman, ili helpos lin, kaŝos kaj faciligos al li la forkuron.

—Kion vi diros, princo? —demandis Hirammon Ramzes.

—La respektinda poliestro parolas saĝe —respondis la maljunulo.

—Vi ja liberigis Kaman de la ĵurpromeso! —ekkriis la princo.

—Mi fenico —respondis Hiram —mi garantias, ke ili ne tuŝos Kaman kaj persekutos la Grekon. Sed la aliaj fideluloj de Astarte..?

—Mi kuraĝas pensi —diris la poliestro —ke dume nenio minacas ĉi tiun virinon. Kaj se ŝi estus kuraĝa, ni povus uzi ŝin por allogi la Grekon kaj kapti lin ĉi tie en la palacoj de via ekscelenco.

—Iru do al ŝi —diris la princo —kaj prezentu al ŝi la planon, kiun vi elpensis. Se vi kaptos la friponon, mi donos al vi dek talentojn.

Kiam la kronprinco adiaŭis ilin,

Hiram diris al la poliestro:

—Ekscelenco, mi scias, ke vi konas ambaŭ skribmanierojn kaj ke la pasta saĝo ne estas fremda al vi. Kiam vi volas, vi aŭdas tra muroj kaj vidas en mallumo. Vi konas la pensojn de la kamparano, kiu laboras kun la sitelo, de la metiisto, kiu portas sandalojn al la bazaro, kaj de l' granda sinjoro, kiu ĉirkaŭita de siaj servistoj sentas sin sendanĝera kiel infano en la seno de l' patrino...

—Vi diras la veron —respondis la oficisto —la dioj donis al mi la miraklan kapablon de la penetrema rigardo.

—Dank' al viaj superhomaj kapabloj —daŭrigis Hiram —vi kredeble jam divenis, ke la templo de Astarte destinas por vi dudek talentojn, se vi kaptos ĉi tiun krimulon, kiu kuraĝas uzurpi la figuron de la princo, nia sinjoro. Krom tio, en ĉiu okazo, la templo donos al vi dek talentojn, se la famo pri la simileco de la mizera Likono al la princo ne disvastiĝos en Egiptio. Tio estas skandalo kaj maldeca afero, ke simpla mortulo rememorigas per sia vizaĝo personojn, kiuj devenas de l' dioj. Ni do konservu sur la fundo de nia koro tion, kion vi aŭdis pri la mizera Likono kaj nian persekuton de la malpiulo.

—Mi komprenas —respondis la oficisto. —Ĉar povas okazi, ke tia krimulo perdos la vivon, antaŭ kiam ni transdonos lin al la tribunalo...

—Jes —diris Hiram, premante lian manon. —Ĉiu helpo, kiun vi postulos, estos donita al vi de Fenicio.

Ili disiĝis, kiel du amikoj, kiuj persekutas grandan ĉasaĵon kaj scias ke indiferente estas, kies poŝtaro trafos, se nur la besto estos bone trafita kaj ne falos en fremdajn manojn.

Post kelke da tagoj Ramzes ree vizitis Kaman, sed trovis ŝin en stato proksima al frenezo. Ŝi kaŝis sin en la plej malluma ĉambro de sia palaco, malsata, ne kombita, eĉ ne lavita, kaj donis plej kontraŭajn ordonojn al la servistoj.

Jen ŝi ordonis al ĉiuj kolektiĝi, jen forpelis ĉiujn. Nokte ŝi alvokis la gardistojn, kaj post momento forkuris de la soldatoj en la subtegmenton, kriante, ke ili volas mortigi ŝin.

Ĉe tiaj agoj, el la animo de l' kronprinco malaperis la amo, kaj restis nur sento de granda embaraso. Li kaptis sin je la kapo, kiam la intendanto de la palaco kaj la oficiro rakontis al li pri tiaj strangaĵoj, kaj murmuretis:

—Vere, mi agis malbone, forprenante tiun ĉi virinon de ŝia diino. Ĉar nur diino povis pacienceti toleri ŝiajn kapricojn..!

Malgraŭ tio li iris al Kama kaj trovis ŝin pala, nekombita kaj tremanta.

—Ve al mi..! —kriis ŝi. —Mi vivas sole inter malamikoj... Mia vestantino volas min veneni, la frizistino, infekti min per ia malsano. La soldatoj nur atendas okazon, por dronigi en mia brusto la lancojn kaj glavojn. En la kuirejo, mi estas certa, anstataŭ manĝaĵoj, oni kuiras sorĉajn herbojn... Ĉiuj konspiras kontraŭ mia vivo...

—Kama... —interrompis la princo.

—Ne nomu min tiel..! —murmuretis ŝi terurita —ĉar tio alportos al mi malfeliĉon...

—De kie tiaj pensoj venas al vi..?

—De kie..? Ĉu vi pensas, ke tage mi ne vidas fremdajn homojn, kiuj aperas kaj malaperas apud la palaco, antaŭ kiam mi povas alvoki la servistojn..? Kaj nokte, ĉu mi ne aŭdas murmuretojn post la muro..?

—Nur ŝajnas al vi.

—Malbenitaj..! Malbenitaj..! —kriis ŝi kun ploro. —Ĉiuj vi diras, ke ŝajnas al mi... Tamen antaŭhierau, en mian dormoĉambron ia krima mano ĵetis vualon, kiun mi portis duonon da tago, antaŭ kiam mi rimarkis, ke ĝi ne estas la mia, ke tian mi neniam posedis...

—Kie estas la vualo? —demandis la princo, jam kun maltrankvilo.

—Mi bruligis ĝin, sed antaŭe mi ĝin montris al la servistinoj.

—Eĉ se ĝi ne estis via, kio okazis

al vi?

—Ankoraŭ nenio. Sed se mi havus tiun ĉifonon en la domo dum kelke da tagoj, mi estus venenita aŭ infektita per neresanigebla malsano... Mi konas Azianojn kaj iliajn rimedojn..!

Tedita kaj kolerigita, la princo forlasis ŝin plej rapide, malgraŭ ŝiaj petoj, ke li restu. Sed kiam li demandis la servistojn pri la vualo, la ĉambristino konfesis, ke tio ne estis la vualo de Kama, kaj ke iu kaŝe ĵetis ĝin en la ĉambron.

"Mi neniam ekkredus —pensis li —ke unu malforta virino povas fari tian konfuzon..! Kvar ĵus kaptitaj hienoj ne povus egali per sia maltrankvilo ĉi tiun fenicinon..!"

Hejme la princo trovis Tutmozis, kiu ĵus venis el Memfiso kaj apenaŭ havis tempon sin lavi kaj alivesti post la vojaĝo.

—Kion vi diros al mi? —demandis la princo la favoraton, divenante, ke li ne alportis bonajn novaĵojn. —Ĉu vi vidis lian sanktecon?

—Mi vidis la sunan dion de Egiptio —respondis Tutmozis, —kaj jen kion li diris al mi...

—Parolu —intermetis la princo.

—Jen kiel parolis nia sinjoro... —daŭrigis Tutmozis, krucinte la manojn sur la brusto kaj klininte la kapon. —Jen kiel parolis la sinjoro: Dum tridek kvar jaroj mi kondukis la pezan veturilon de

Egiptio kaj mi jam estas tiel laca, ke mi sopiras al miaj grandaj antaŭuloj, kiuj loĝas en la okcidenta lando. Baldaŭ mi forlasos ĉi tiun teron, kaj tiam mia filo, Ramzes suriros la tronon kaj faros kun la ŝtato, kion diktos al li la saĝo...

—Tiel diris mia sankta patro?

—Tio estas liaj vortoj, fidele ripetitaj —respondis Tutmozis. —Kelkfoje klare diris al mi la sinjoro, ke li lasas al vi neniajn ordonojn por la estonteco, por ke vi povu administri Egiption, kiel vi mem volos...

—Ho sankta..! Ĉu vere li fartas tiel malbone..? Kial li ne permesas, ke mi vizitu lin..? —demandis la ĉagrenita princo.

—Vi devas esti ĉi tie, ĉar ĉi tie vi povas esti utila.

—Kaj la traktato kun Asirio..? —demandis la princo.

—Jen ĝia enhavo: Asirio povas, sen malhelpoj de nia flanko, konduki militon en la oriento kaj nordo; sed la demando pri Fenicio restas nesolvita, ĝis kiam vi suriros la tronon.

—Ho benita..! ho sankta monarĥo..! —kriis la princo. —De kia terura heredaĵo vi savis min...

—La demando pri Fenicio restas do nesolvita —daŭrigis Tutmozis. —Tamen okazis alia malbona afero, ĉar lia sankteco, por doni al

Asirio pruvon, ke li ne malhelpos ĝin en ĝia milito kontraŭ la nordaj popoloj, ordonis malgrandigi nian armeon je dudek mil dungitaj soldatoj...

—Kion vi diris..? —ekkriis la princo kun mirego.

Tutmozis malgaje balancis la kapon.

—Mi parolas la veron —diris li —oni eĉ jam nuligis kvar libiajn regimentojn...

—Tio ja estas frenezo..! —preskaŭ kriegis la princo, tordante siajn manojn. —Kial ni tiel malfortigas nin kaj kien iros ĉi tiuj homoj..?

—Jes, jes! Ili jam foriris en la libian dezerton: ili aŭ atakos Libianojn, kio kaŭzos al ni embarasojn, aŭ kuniĝos kun ili kaj invados niajn okcidentajn limojn...

—Nenion mi aŭdis pri tio..! Kion ili faris..! Kaj kiam ili faris tion..? Neniu novaĵo atingis nin... —kriis la princo.

—Ĉar la eksigitaj dungitoj iris de Memfiso en la dezerton, kaj Herhor malpermesis paroli pri tio al iu ajn...

—Do eĉ Mefres kaj Mentezufis ne scias pri tio..? —demandis la vicreĝo.

—Ili scias —respondis Tutmozis.

—Ili scias, kaj mi ne..!

La princo trankviliĝis subite, sed paliĝis, kaj sur lia juna vizaĝo estis legebla terura malamo. Li kaptis sian konfidaton je ambaŭ manoj kaj, forte premante ilin, murmuretis:

—Aŭskultu... Per la sanktaj kapoj de mia patro kaj patrino... per la memoro de Ramzes Granda, per ĉiuj dioj, se iaj ekzistas, mi ĵuras, ke dum mia regado, se la pastroj ne kliniĝos antaŭ mia volo, mi dispremos ilin...

Tutmozis aŭskultis terurita.

—Mi, aŭ ili..! —konkludis la princo. —Egiptio ne povas havi du sinjorojn...

—Kaj ĉiam ĝi havis nur unu: la faraonon —intermetis la konfidato.

—Vi do estos fidela al mi..?

—Mi, la tuta nobelularo, armeo, mi al vi ĵuras.

—Sufiĉe —finis la kronprinco. —Ili nun nuligu niajn dungitajn regimentojn... ili subskribu traktatojn... ili sin kaŝu de mi kiel vespertoj, kaj ili trompu nin ĉiujn... Sed venos la momento...

Kaj nun, Tutmozis, ripozu post la vojaĝo kaj venu vespere al mia festeno... Ĉi tiuj homoj tiel ligis min, ke mi povas nur amuziĝi... Mi do amuziĝos... Sed iam mi montros al ili, kiu estas la estro de Egiptio: ili, aŭ mi..!

De tiu tago ree komenciĝis festenoj. La princo, kvazaŭ

hontante la soldatojn, ne faris kun ili ekzercojn. Anstataŭe, en lia palaco svarmis nobeluloj, oficiroj, artistoj kaj kantistinoj, kaj nokte dum grandaj orgioj la sonoj de harpoj kuniĝis kun la kriegoj de la ebriaj festenantoj kaj kun spasmaj ridoj de l' virinoj.

Al unu el tiaj festenoj Ramzes invitis Kaman, sed ŝi rifuzis. La princo ofendiĝis je ŝi; rimarkinte tion, Tutmozis diris:

Oni diris al mi, ke Sara perdis viajn favorojn?

—Ne parolu al mi pri tiu ĉi hebreino —respondis la vic-reĝo. —Vi kredeble scias, kion ŝi faris kun mia filo?

—Mi scias —respondis la favorato —sed ŝajnas al mi, ke tio okazis ne per ŝia kulpo. Mi aŭdis en Memfiso, ke via respektinda patrino, Nikotris, kaj la ministro Herhor faris vian filon Hebreo, por ke li en la estonteco reĝu Izraelidojn...

—Izraelidoj ne havas ja reĝon, sed pastrojn kaj juĝistojn..! —interrompis la princo.

—Ili ne havas, sed ili volas havi. Ankaŭ ilin tedis la regado de pastroj.

La kronprinco malestime ekskuis la manon.

—La veturigisto de lia sankteco —respondis li —valoras pli multe, ol ĉiuj reĝoj, kaj tiom pli ol iu izraelida reĝo, kiu ankoraŭ ne

ekzistas...

—En ĉiu okazo la kulpo de Sara ne estas tiel granda —intermetis Tutmozis.

—Jes. Estu certa, ke iam mi reguligos la kontojn ankaŭ kun la pastroj.

—En ĉi tiu okazo ili ankaŭ ne estas tre kulpaj. Ekzemple Herhor faris tiel, por pligrandigi la gloron kaj potencon de via dinastio. Cetere li agis konsente kun la reĝino Nikotris.

—Kaj Mefres, kial li miksas sin je miaj aferoj..? —demandis la princo. —Li ja devas, ŝajnas al mi, nur gardi la templon, kaj ne influi la sorton de la faraona idaro...

—Mefres estas maljunulo, kiu jam komencas infaniĝi. La tuta kortego de lia sankteco ridas hodiaŭ Mefreson pro liaj procedoj, pri kiuj mi mem sciis nenion, kvankam preskaŭ ĉiutage mi vidis kaj vidas la sanktan viron...

—Interesa afero... Kion li faras..?

—Kelke da fojoj ĉiutage li solene diservas en la plej sekreta parto de la templo kaj ordonas al siaj pastroj observi, ĉu dum lia preĝado la dioj ne levas lin en la aeron..?

—Ha..! ha..! ha..! —ridis la princo. —Kaj ĉio ĉi okazas ĉi tie, en Pi-Bast, antaŭ miaj okuloj, kaj mi scias nenion...

—Pastra mistero...

—Mistero, pri kiu parolas ĉiuj en Memfiso..! Ha..! ha! En la cirko mi vidis ĥaldean prestidigitatoron, kiu leviĝis en la aeron.

—Mi ankaŭ vidis —interrompis Tutmozis. —Sed tio estis artifiko. Mefres volas vere leviĝi super la teron, sur la flugiloj de sia pieco...

—Kia arlekenaĵo..! —diris la princo. —Kion pensas pri tio la aliaj pastroj?

—Ŝajnas, ke en niaj antikvaj papirusoj oni skribas pri niaj malnovaj profetoj, kiuj posedis la kapablon leviĝi en la aeron, la pastrojn do ne mirigas la deziro de Mefres, kaj ĉar ĉe ni, kiel vi scias, la subuloj vidas tion, kio plaĉas al la estroj, kelkaj sanktaj viroj certigas, ke Mefres vere leviĝas dum la preĝo, la larĝon de kelke da fingroj super la teron...

—Ha... ha... ha... Kaj ĉi tiu granda mistero amuzas la tutan kortegon, kaj ni, kvazaŭ kamparanoj aŭ fosistoj, scias nenion pri la mirakloj, farataj ĉe nia flanko... Mizera sorto de la egipta kronprinco..! —ridis Ramzes.

Kiam li trankviliĝis, post dua peto de Tutmozis li ordonis transporti Saran kun la infano el la ĉambro de l' servistoj en la palaceton, kiun en la unuaj tagoj okupis Kama.

La servistoj de la princo estis ravitaj per ĉi tiu ordono de la si-

njoro, kaj ĉiuj servistinoj, sklavoĵoj, eĉ ŝtribistoj akompanis Saran al la nova loĝejo kun muziko kaj ĝojaj krioj.

La fenicino, aŭdinte la bruon, demandis pri la kaŭzo. Kiam oni respondis al ŝi, ke Sara jam revenis al la favoroj de l' princo, kaj transloĝiĝis el la domo de l' sklavoĵoj en la palacon, la eks-pastrino furiozanta alvokis al si Ramzeson.

La princo venis.

—Jen kiel vi agas kun mi..! —kriis Kama, ne reganta sin plu. —Tiel do..? Vi promesis al mi, ke mi estos via unua virino, sed antaŭ kiam la luno trakuris duonon de la ĉielo, vi rompis la promeson..? Eble vi pensas, ke la venĝo de Astarte falas nur sur pastrinojn, kaj ne atingas princojn..?

—Diru al via Astarte, ke ŝi neniam minacu la princojn, alie ankaŭ ŝi iros en la ĉambron de l' sklavoĵoj —respondis trankvile la princo.

—Mi komprenas! —kriis Kama. —Mi iros al la sklavoĵoj, eble eĉ en la malliberejon, kaj vi dume pasigos la noktojn ĉe via hebreino..! Jen kiel vi pagas al mi, kiu forlasis por vi la diinon, kiu altiris sur mian kapon la malbenon... Al mi, kiu ne havas eĉ unu trankvilan horon, kiu perdis por vi la junecon, vivon, eĉ animon..!

La princo konfesis en sia koro, ke

efektive Kama multe oferis por li, kaj li eksentis penton.

—Mi ne estis kaj mi ne estos ĉe Sara —respondis li. —Sed ĉu malutilas vin, ke la malfeliĉa virino ree ricevos komforton kaj povos nutri sian infanon?

La fenicino ekremis. Ŝi levis supren la kunpremitajn pugnojn, stariĝis ŝiaj haroj, kaj en la okuloj ekflamis la malpura fajro de la malamo.

—Tiel vi respondas al mi..? La hebreino estis malfeliĉa, ĉar vi elpelis ŝin el la palaco; kaj mi devas esti kontenta, kvankam la dioj elpelis min el ĉiuj temploj... Kaj mia animo... la animo de l' pastrino, kiu dronas en larmoj kaj timo, ĉu ĝi ne valoras por vi pli multe ol tiu hebrea bastardo, kiu... ho... ne vivu plu... kiun...

—Silentu..! —kriis la princo, fermante al ŝi la buŝon.

Ŝi posteniĝis timigita.

—Malpermesite do estas eĉ plendi pri mia mizero..? —demandis ŝi. —Sed se vi tiel zorgas pri la infano, kial vi ŝtelis min el la templo, kial vi promesis, ke mi estos ĉe vi la unua virino..? Gardu vin, ke Egiptio, ekkoninte mian sorton, ne nomu vin ĵurrompanto..!

La princo balancis la kapon kaj ridetis. Fine li sidiĝis kaj diris:

—Vere, mia instruisto estis prava,

avertante min kontraŭ la virinoj. Vi estas kiel matura persiko por la okuloj de l' homo, kies langon sekigis la soifo... Sed nur ŝajne... Ĉar ve al malsaĝulo, kiu kuraĝos dismordi la belan frukton: anstataŭ refreŝiga dolĉo li trovos neston de vespoj kiuj vundos al li ne nur la lipojn, sed ankaŭ la koron.

—Vi jam plendas..? Eĉ tiun ĉi honton mi devas suferi, mi kiu oferis al vi mian pastrinan rangon kaj ĉastecon..!

La princo daŭrigis balanci la kapon kaj rideti.

—Mi neniam pensis, ke povas realiĝi la fabelo, rakontata de la kamparanoj, kiam ili prepariĝas por dormi. Hodiaŭ mi vidas, ke jes Aŭskultu do Kama, vi eble pripensos kaj ne devigos min forpreni mian bonan volon, kiun mi havas por vi.

—Li volas nun rakonti fabelojn..!
—respondis la pastrino maldolĉe.
—Vi jam rakontis al mi unu, kaj mi bone sukcesis, obeinte ĝin...

—Ĉi tiu sendube estos utila por vi, se nur vi volos ĝin kompreni...

—Ĉu estos en ĝi io pri hebreaj infanaĉoj..?

—Kaj pri pastrinoj. Sed aŭskultu atente: Tio okazis, antaŭ tre longe en la sama urbo Pi-Bast. [aŭtentika rakonto] Foje la princo Satni, sur la placo antaŭ la templo

de Ptah, ekvidis tre belan virinon. Ŝi estis pli bela ol ĉiuj, kiujn li iam ajn renkontis, kaj, pli grava afero, ŝi havis sur si multe da oro. Ŝi ekstreme ekplaĉis al la princo. Li eksciis, kiu ŝi estas, kaj kiam oni diris al li, ke ŝi estas filino de la ĉefpastro de Pi-Babst, li sendis al ŝi sian ĉevalestron kun jena propono:

"Mi donos al vi dek orajn ringojn, se vi pasigos kun mi unu mal-longan horon."

La ĉevalestro iris al la bela Thubui kaj ripetis al ŝi la vortojn de la princo Satni. La sinjorino aŭskultis lin favore kaj respondis, kiel konvenas al bone edukita fraŭlino: "Mi estas filino de ĉefpastro, mi estas ĉasta knabino, ne virino malpura. Se do vi, princo, volas havi la plezuron koniĝi kun mi, venu en mian domon, kie ĉio estos preparita, kaj kie niaj rilatoj estos garditaj de la ĉikanoj de l' virinoj de la tuta strato."

La princo Satni sekvis la fraŭlinon Thubui al la supera etaĝo en ŝiajn ĉambrojn, kies muroj estis kovritaj per lapis-lazuli kaj pale-verda emajlo. Estis tie multaj litoj, kovritaj per reĝa tolo kaj ne malmulte da unupiedaj tabletoj, ŝarĝitaj per oraj pokaloj. Oni plenigis unu pokalon per vino kaj donis ĝin al la princo. Thubui diris: "Bonvolu trinki". La princo respondis: "Vi scias ja, ke mi ne venis por trinki vinon". Ili tamen sidiĝis al la festeno. Thubui havis

longan, netravideblan veston, fermitan ĝis la kolo. Kiam la princo volis ŝin kisi, ŝi forpuŝis lin kaj diris:

"Tiu ĉi domo estos via domo. Memoru tamen, ke mi ne estas malĉastulino, sed pura virino. Do se vi volas, ke mi obeu vin, ĵuru al mi la fidelecon kaj testamentu al mi vian havon."

"Venu do ĉi tien skribisto!" —ekkriis la princo. Kiam oni alkondukis lin, Satni ordonis skribi edziĝan akton, per kiu li cedis la tutan sian monon kaj bienojn je la nomo de Thubui.

Post unu horo oni sciigis al la princo, ke malsupre atendas liaj infanoj. Tiam Thubui forlasis lin, sed tuj revenis en vesto el diafana tulo. Satni ree volis ŝin ĉirkaŭpreni, sed ŝi forpuŝis lin, dirante:

"Ĉi tiu domo estos via domo. Sed ĉar mi ne estas malĉastulino, sed pura knabino, se do vi volas min posedi, faru viaj infanoj akton pri la rezigno de la havo, por ke ili poste ne procesu kun miaj infanoj."

Satni alvokis siajn infanojn supren kaj ordonis al ili subskribi la akton pri la cedo. La infanoj obeis. Sed kiam la princo, ekscitita per la longa kontraŭstaro, volis proksimiĝi al Thubui, ŝi ree detenis lin...

"Ĉi tiu domo estos via domo —diris ŝi. —Sed mi ne estas la

unua veninta, mi estas pura virgulino. Se vi amas min, ordonu mortigi viajn infanojn, por ke ili iam ne senigu la miajn je la havo..."

—Kia longa rakonto..! —interrompis malpacience Kama.

—Ĉi tuj estos finita —respondis la princo. —Jen, Kama, la respondo de Satni:

"Se vi tion deziras, plenumiĝu la krimo..!"

Oni ne bezonis ripeti tion al Thubui. Antaŭ la okuloj de l' patro ŝi ordonis mortigi la infanojn, kaj iliajn sangantajn membrojn ŝi ĵetis tra la fenestro al hundoj kaj katoj, Nur tiam Satni eniris en ŝian ĉambron kaj kuŝiĝis sur ŝia ebena lito, inkrustita per eburo.

—Thubui bone faris, ne kredante al la vortoj de viroj —diris kolere la fenicino.

—Sed Satni faris ankoraŭ pli bone —respondis la princo —li vekiĝis, ĉar lia terura krimo estis nur sonĝo... Ankaŭ vi, Kama, memoru, ke la plej certa rimedo veki viron el lia ama deliro estas ĵeti malbenojn sur lian filon.

—Estu trankvila, sinjoro, neniam plu mi parolos al vi pri mia malferliĉo, nek pri via filo —malgaje respondis la fenicino.

—Kaj mi ne reprenos mian favoron por vi kaj vi estos feliĉa —finis Ramzes.



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels92.pdf>

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k92.html>

Enhavo

Redaktore.....2

Ĉu novaj politikistoj faros
novan politikon en
Hispanio?.....3

Aldonu merizojn al pavo ..5

Humursenco neniam kaŝu
amsencon.....8

Alia mondo eblas10

La Faraono, ĉ. 41^a14

ISSN 1886-1997 aŭ
1886-1938 (se printite)
Depósito legal: Z-2398-88

Prezidas: Johano A. Cabezos.
Redaktas: Jesuo de las Heras.
Korektas: Jozefo Pina.
Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj
respon-decas la aŭtoro, ne la
redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon kies
enhavo ne mistraktu personon.

Kovrilo: Nova politikisto
Paŭlo Iglesias Turrión.

Same kiel Esperanto, senpaga
estas la ilaro, per kiu ĉi tiu bulteno
estas farata: Ubuntu', LibreOffice,
Gimp, Scribus, Bluefish kaj gFtp.

Pagmaniero: abonu €5 jare en La Caixa

Konto ES30 2100 4617 4122 0011 5275.

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Pagintoj ricevas surpaperan kopion de Kajeroj el la Sudo.